

EL POPOLA ĈINIO


Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo
Redakcio kaj Administracio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

VOL. 1 N-RO 6
OKT. 1950

人民中國報道

SPECIALA NUMERO

por
la unua nacia festo de
Ĉina Popola Respubliko



EMBLEMO DE ĈINA POPOLA RESPUBLIKO

NACIA HIMNO DE ĈINA POPOLA RESPUBLIKO


(La Marŝo de la Volontuloj)

Teksto de Tien Han
Melodio de Nier


Marŝe Viveco



(Trumpetsolo)



起 來，不 願 作 奴 隸 的 人 們！ 把 我 們 的 血 肉，
Ki-lai, bu yan zo nu-li di rhen-men! Ba wo-men-di xye-rhou
Al lukt', ni ĉi-uj ne-sklav-vo-laj! De-di-ĉu l' san-gon




築 成 我 們 新 的 長 城！ 中 華 民 族 到 了 最 危 險 的 時
zhu-cheng wo-men sin-di Chang-cheng! Zhung-xua min-zu dao-liao zui wei-xian-di sh-
por la kre' de no-va Grand-mur! Nun Ĉi-ni-o ve-nas al gra-va kriz-



候， 每 個 人 被 迫 着 發 出 最 大 的 吼 聲 起 來！ 起 來！ 起
xou, Mei-go rhen bei po-zho fa-chu zui-da-di xou-sheng. Ki-lai! ki-lai! ki-
hor'. Ĉi-uj fi-ne de-vas kri-i laŭ-te kun veng-jur'. Al lukt'! al lukt'! al



來 我 們 萬 眾 一 心， 冒 着 敵 人 的 炮 火 前 進！
lai! Wo-men wan-zhung i-sin, Mao-zho di-rhen-di pao-xuo sian-zin!
lukt'! Mi-loj ni kon-kor-de Spi-te! mal-a-mik-ku-gloja mar-ŝu!



冒 着 敵 人 的 炮 火 前 進！ 前 進！ 前 進！ 進！
Mao-zho di-rhen-di pao-xuo cian-zin! Cian-zin! cian-zin! zin!
spi-te! mal-a-mik-ku-gloja mar-ŝu! Mar-ŝu! mar-ŝu! mars'!

Rimarkoj pri la Nacia Himno

1) La unua vico de la teksto estas la ĉina originalo; la dua vico, prononco de la originalo laŭ latiniga sistemo. Elparolo de ties literoj plejparte similas al Esperanto, sed troviĝas kelkaj malsimilaj. Ni ilin klarigas jene:

y—similas al “ü” en internacia fonetika signaro:

rh—similas al “j” en Esp-o:

x—similas al “h” en Esp-o:

zh—similas al “dʒ” en internacia fonetika signaro:

sh—similas al “ŝ” en Esp-o kaj povas prononci memstare.

2) Esperanta teksto en la tria vico estas neoficiala traduko fare de k-do Honfan.

SP
R
2
SP
30/10/50

GRANDA PARADO DE NACIA TAGO

La unua de oktobro, 1950, estas ĝojiga granda tago por la Tut-Ĉinia kaj tut-mondaj popoloj. En tiu tago, en la ĉina popola ĉefurbo okazis grandioza parado de pli ol 400,000 militistoj kaj civiluloj. Tiu ĉi parado per vivecaj kaj tipaj faktoj pruvis la jenan veron: pasinte, la Tut-Ĉinia popolo sekvas prezidanton Maŭ kaj gajnis la hodiaŭan tiel grandan venkon, estonte, ni nur ĉiam sekvas Prezidanton Maŭ, kaj ni nepre gajnos pli grandan venkon.

La 11-an atm, subite ektondregis salutaj pafegoj oriente de la Pordego Tien-An. La parado de la fortaj populaj armitaj trupoj komenciĝis. Tra la sunbrila Popola Placo parade marŝantaj estis la aera, mara, kaj landa armeoj, tankoj, haŭbizoj, montaj kanonoj, kontraŭaerplanaj kanonoj, kavalerioj kaj motortrupoj. Ĉio ĉi estas la rezultato de 23-jara brava batalado de la ĉina popolo. Ĉiu sentas fieron pri la posedo de tiel forta armeo, kaj firme kredas al la feliĉa estonteco. Dum Prezidanto Maŭ kaj Ĉefkomandanto Ĉu revuis sur la Pordego Tien-An, la propramane elkulturitajn grandajn populajn armeojn, ili mansvingis re- kaj re-foje por respondi al la salutoj. La reprezentantoj de la 36 enlandaj frataj nacioj vidante aeroplanojn kaj tankojn eksaltis de ĝojo. Sur la teraso por invititoj, la diverslandaj ambasadoroj kaj delegitoj de la Monda Federacio de Demokrata Junularo foje kaj refoje aplaudadis kaj ĝojkriadis. Fiksrigardante la bravan manieron de ĉiu el la paradantaj trupoj, oni rememoris la malfacilajn jarojn. Kiam la trupoj de Prezidanto Maŭ kaj tiuj de Ĉefkomandanto Ĉu renkontiĝis kaj unuiĝis sur Ĉinkang Monto, la Ruĝa Armeo de la ĉinaj kampularoj kaj laboristaro estis nur gerilo de malpli ol 6,000 anoj. Sed sub la ĝusta gvidado de Prezidanto Maŭ, ĝi ne nur venkis la enlandan reaktularon, liberigis la tutan patrolandon escepte de Tajvan kaj Tibeto, sed ankaŭ sin ekipis per armiloj prenitaj de la malamiko. La historio de la disvolvigo de Ĉina Popola Liberiga Armeo brile pruvis la ĝustecon de la milita strategio de Prezidanto Maŭ. Samtempe la historio de la disvolvigo de Ĉina Popola Liberiga Armeo garantias al la tutlanda popolo kaj deklaras al la minacantoj de mondpaaco:

se la Usona imperiisto aŭdacus ekinvas nian sanktan patrolandon, ĝi nepre spertos pli teruran fiaskon ol kian spertis la bandita kliko de Ĉang Kaj-ŝek kaj la japana imperiisto.

La impona procesio de la fortaj populaj armetrupoj trapasis la placon antaŭ la Pordego Tien-An, kaj el la Orienta Pordotrio oriente de la Pordego Tien-An tajde alfluegis granda labor-armeo el 200,000 anoj—fluego de laboristoj kaj kampuloj. Ili alte tenis milojn da portretoj de Prezidanto Maŭ, Generalisimo J. Stalin kaj popolgvidantoj de diversaj landoj. Sur la alte tenataj tabuloj de la fervojistoj skribiĝis la rezultatoj de ilia laborado. En tiu ĉi jaro, la efikeco de la fervoja trafiko plialtiĝis je 50 procentoj ol tiu de la pasinta jaro. En la tuta lando nun estas 21,742 kilometroj da fervojo en funkciado. La laboristoj de Ŝihĝingŝan Elektrejo, ŝultre portante la skemon de la dinamo n-ro 6, alrigardadis al Prezidanto Maŭ kun ĝojo kaj ekscitiĝo, ĉar ili penlaboradis tage-nokte, finripis la dinamon n-ro 6 kaj garantiis la elektroprovizadon al la loĝantaro de la ĉefurbo. La karboministoj, same kiel la fervojistoj, en la krea laborado en la konstruado de la patrolando, plenumis admirindan taskon: la tuta produktokvanto de la ŝtataj karbominejoj pligrandiĝis je pli ol 37 procentoj kompare kun tiu de la pasinta jaro.

Post la agrara reformo, la kampuloj en la ĉirkaŭaĵo de la ĉefurbo la unuan fojon surportis bonordajn vestojn. Ili speciale dankas Prezidanton Maŭ. Kiam la paradantoj almarŝis antaŭ la estrado ili longdaŭre mansvingadis kaj ĝojkriadis. Vidante, ke Prezidanto Maŭ estas en bona sanstato, ili diris ripete: "Nun ni trankviliĝas." La studentoj de agromonia kolegio alte tenis dikajn riz-kaj tritikspikojn kaj neĝblankan kotonon, kiuj simbolas la abundan rikolton de la patrio. Ĉijare, sub la gvidado de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Popola Registaro, ni venkis diversajn plagojn kaj rikoltis riĉajn rikoltojn de ambaŭ somero kaj aŭtuno; la produktokvanto de greno kaj kotono superis la ciferojn en la produktoplane. Rikoltiĝis 10,000,000,000 kilogramojn pli da greno kaj 260,000,000 kilogramojn pli da kotono ol pasintjare.

Ĉiuj ĉi grandaj sukcesoj en industrio kaj agrikulturo estas ĝuste kiel la reprezentantoj de la tutlandaj labormodeloj diris, "la rezultato de la prudenta gvidado de Prezidanto Maŭ."

Tra la placo antaŭ la Pordego Tien-An, tajde fluegis de-oriente okcidenten la ebric ĝojega homfluego konsistanta el laboristoj, funkciuloj, instruistoj, terkulturistoj, studentoj, lernejoj geknaboj, oficistoj kaj aliaj civitanoj. La homfluego kaŭzis skuantan soneton dum la moviĝado tra la Orienta Pordotrio al la Pordego Tien-An. Cent miloj kriegadis: "Vivu Prezidanto Maŭ!" La feliĉaj geknaboj de la Junaj Pioniroj ekvidinte Prezidanton Maŭ, saltante eljetis alten freŝajn florojn el siaj manoj kaj alten levis la kartonajn kolombojn kaj torĉo-desegnaĵojn al la ĉielo. Trupo da hejme laborantaj virinoj mallaŭte kaj malpacience interdemandadis: "Kiu estas Prezidanto Maŭ?" Iu urbano alten levis sian infanon, kiu saltetante ĉe la sino de sia patro mansvingadis al la Pordego Tien-An. Sur la turo de la Pordego Tien-An, Prezidanto Maŭ svingadis sian dekstran manon por saluti al la ĝojkriantaj homamasoj. Malgraŭ la urĝigado de la kamaradoj-gvidantoj de la paradaj vicoj, la parada procesio moviĝadis ankoraŭ malrapide. Iu maljunulo el la Unua Kvartalo grumbliis al la kamarado-gvidanto bonmotivate: "Junulo vi estas, sed mi jam estas tiel maljuna; se mi ne nun bone rigardus Prezidanton Maŭ, poste kiam mi povus?" Iu maljunulo de pli ol 70 jaroj kuris el la vicoj por proksimiĝi al la estrado, kaj svingante sian ĉapon li ĝojkriis: "Vivu Prezidanto Maŭ!" Sur la teraso por invititoj, la reprezentantoj de la minoritatoj eldiris la sekvantajn kortuŝajn vortojn: "La popolo tiel amegas sian gvidanton, kaj la gvidanto tiel respektas la popolon: jen la vera popola gvidanto!"

Sur la rigardaj terasoj ĉe ambaŭ flankoj de la Pordego Tien-An sidis la komitatanoj de la Tutlanda Komitato de la Politika Konsiliĝa Konferenco de Ĉina Popolo, reprezentantoj de diversaj demokratiaj partioj kaj frataj nacioj kaj delegitoj de la tutlandaj batalherooj kaj labormodeloj. Jen estas la respegulaĵo de la granda unuiĝo de la ĉina popolo. Prezidanto Maŭ nin foje kaj refoje instruadis: Se nur ni persistadas en popoldemokratia diktatoreco kaj unuiĝo kun internaciaj amikoj, ni certe ĉiam venkados. Hodiaŭ, kiam la popolo revuis siajn fortojn, la demokratiaj partioj de



PREZIDANTO MAŬ ZE-TUNG RESPONDAS LA SALUTOJN DE LA ĜOJEGA POPOLO DUM LA NACIA FESTO

la tuta lando kune donacis honoran standardon al Prezidanto Maŭ, sur kiu skribiĝas: "Ni ĉiam vin sekvos." Tiuj ĉi vortoj funde konkludis la ĉinajn revoluciajn spertojn kaj klare montris la vojon por la daŭra antaŭenmarŝo de la ĉina popolo.

La procesio de la reprezentantoj de la minoritatoj montriĝis miniaturo de la amika unuiĝo de la Nov-Ĉiniaj nacioj. Preterpasis 4,000 mahometanoj sub la verda luno-stela standardo; la delegitoj de 36 nacioj (uifuroj, kazaĥoj kaj tataroj el la nordo kaj sudo de Tienŝan Montaro, tibetanoj kaj mahometanoj el Kansu kaj Ĉinghai Altlandoj, mongoloj el Sujĵuan-provinco, Miaŭ, Jaŭ, Li, Ji, Moŝe el la sudorienta limregiono de la patrio kaj aliaj nacioj), en siaj festotagaj vestoj, ludante siajn naciajn melodiojn kantante kaj dancante traŝvebis la placon kvazaŭ koloritaj nuboj. Ĉiuj ili suferis dum multaj jaroj la ekspluatadon, priabandon kaj malestimon de la reaktularo, nun ili ĝuas la bonvenigon kaj respekton de la loĝantaro en la ĉefurbo; ili vidas, ke Prezidanto Maŭ ame mansvingadas al ili; ili sentas la feliĉon vivi en la harmonia familieco de ĉina nacio. Ables, delegito de la nacio uifura diris: "La malsamaj situacioj de la pasinteco kaj la nuntempo konigis al mi, ke la ŝtato sub la gvido de Prezidanto Maŭ estas la komuna ŝtato de ĉiuj enlandaj nacioj, kaj Prezidanto Maŭ estas ilia komuna gvidanto."

La ĉina popolo atingis en la pasinta jaro tian sukceson, kian ĝi neniam atingis en la pasintaj jarcentoj. Hodiaŭ sur la placo antaŭ la Pordego Tien-An, la pli-ol-kvarecentmila organizita popolamaso el ĉiuj klasoj kaj unuiĝintaj nacioj plie montris antaŭ Prezidanto Maŭ la volon de 475,000,000 ĉinoj: Ili batalados sub la gvidado de Prezidanto Maŭ por konstrui kaj protekti sian feliĉan vivon!



NI FESTAS NIAN NACIAN FESTON

Gu Juan

Laŭlum

BONVENIGO AL JUNULA DELEGITARO



Imponaj scenoj de varma internacia amikeco kaj solidareco por paco kontraŭ la imperiistaj militprovokantoj regis

la grandan kunvenon en Pekino, la 24-an de septembro, kiam 50,000 junuloj en la majesta placo de la antaŭa Imperia Palaco de Ĉinio aplaudis, kantis kaj burais solenan bonvenigon al la 42 junul-representantoj el 32 landoj.

La Pekina urbestro Nieh Ĵung-ĉen (聶榮臻) per mallonga parolado donis al la junaj delegitoj dignan civitanan bonvenigon al la ĉina ĉefurbo, kaj manpremis kun ĉiu el ili. Liaŭ Ĉeng-ĉih (廖承志), prezidanto de la Tut-Ĉinia Federacio de Demokrataj Junuloj, malfermis la kunvenon, kaj sekvante lin parolis Feng Ven-pin (馮文彬), sekretario de la Centra Komitato de la Novdemokratia Junula Ligo de Ĉinio. Iliaj vortoj kaŭzis vastan ĉhon inter la aŭskultantoj.

"Karaĵ kamaradoj kaj amikoj," diris Feng Ven-pin, "ni esprimas nian altan takson pri via vizito per obligo de nia penado por subteni la pac-kampanjon. Sekvante la bonan ekzemplon de sovetiaj junuloj, ni manon en mano marŝu antaŭen sub la standardo de la Monda Federacio de Demokrata Junularo.

"Ĉinaj junuloj, kiuj akiris sian venkon post longa batalado, plej bone komprenas la gravecon de paco. Ni volas pacon, sed ne pacon je ia ajn prezo. Nek ni sidas atendi pacon. Ni batalas por ĝi kaj defendos ĝin. Se la Usonaj imperiistoj kuraĝas iniciati agresan militon al ni, ni, kune kun la ĉina popolo, sub la gvidado de Prezidanto Maŭ Ze-tung, forbatos kaj venkos ilin. Ni estas certaj pri tio.

"Ĉi tie ni garantias al vi, al la demokrataj junuloj tra la tuta mondo, ke ĉinaj junuloj ĉiam restos viaj armitaj kamaradoj kaj firmaj subtenantoj de la mondpaco kaj demokrata fronto, kaj ke ĉinaj junuloj ŝparos nenian oferon por la eterna paco kaj popola demokratio."

Tondradis longdoŭraj aplaŭdoj kiam Vu Han (吳晗), ĝenerala sekretario de la

Tut-Ĉinia Federacio de Demokrataj Junuloj, prezentis la delegitojn unu post la alia, kiuj kunpremis siajn manojn super la kapoj aŭ donis aliajn salutesprimojn desolidareco kun la varmkora ĵuna aŭskultantaro. Elegante vestitaj Junaj Pioniroj prezentis florojn al la delegitoj.

En sia parolado Boccara, ĉefo de la delegitaro, citis poemon verkitan de Prezidanto Maŭ Ze-tung en Kansu-Montaro dum la Longa Marŝado: "Ni faris longan ŝuaron por la tempo, kiam ni ligos la drakon kiu subpremis Ĉinion." "Vi jam estas ligintaj la drakon en Ĉinio," aldonis Boccara, "kaj nun la popoloj de la mondo faras ŝuaron por ligi la drakon de milito kaj subpremo."

La vortoj de Semitchastny, Sekretario de la Centra Komitato de la Tutunia Lenina Junkomunista Ligo, "Ĉiuj novaj sukcesoj de la ĉina popolo plenigas la sovetian popolon kaj sovetiajn junulojn per granda ĝojo," kaŭzis grandan ĉhon de ĉiuj ĉeestantoj.

Oni donis specialan ovacion al la korea delegito, kies parolado, plena de konfido al la venko de korea popolo, estis ofte interrompita de aplaŭdoj.

Kiam Roger Guibert, franca delegito, finis sian paroladon, post Vu Xuan-vinh, la stabestro de iu Viet-Nama regimento kaj batala heroo en la milito kontraŭ la francaj koloniistoj, okazis frapa sceno de la unuiĝo de la popoloj kontraŭ la militagantoj: kiam Guibert prezentis al Vu standardon kiun la francaj junuloj donacis al la Viet-Namaj junuloj, tiam Vu salutis la Francan Komunistan Partion kaj kriis: "Vivu Thorez!"



La du grandaj Kongresoj de Batalaj Herooj kaj Modelaj Laboristoj malfermiĝis la 25-an de septembro en Pekino. Okazis en la granda salono de antaŭaj imperiistoj de Ĉinio la unua komuna kunveno, en kiu kunvenis armeaj herooj kun amasoj da medaloj brilantaj sur iliaj elegantaj novaj uniformoj, laboristoj en simplaj kotonaj vestoj, kaj kampanoj portantaj blankajn ŝvittukojn ĉirkaŭ siaj kapoj. La kongresoj bonvenigis kiel honorajn gastojn la delegitojn de la Monda Federacio de Demokrata Junularo.

Mesaĝo de la Centra Komitato de Ĉina Komunista Partio, kiun Prezidanto Maŭ Ze-tung legis, kaj la paroloj de gvidantoj de la registaro kaj popolaj organizoj, ĉiuj akcentis ke la herooj reprezentas la milojn da modelaj laboristoj en diversaj sferoj kaj plie milionojn kiuj nun konscie klopodas levi la produktajn normojn en la tuta lando kaj plenumi la modernigon de la armeo.

Vicministro Ĉen Jun, (陳雲) prezidanto de la Komitato de Financaj kaj Ekon-

omaj Aferoj, substrekis la karakteron de la kongresoj en sia malferma parolado. Estas signifoplena, li diris, ke la du grandaj kongresoj okazis ĉe la unuajara datreveno de la fondiĝo de la Respubliko en 1. okt., kiam ĉina ekonomia situacio rapide pliboniĝas sed kiam la usonaj imperiistoj provas grandigi la areon de sia agreso. La pactendaro jam fariĝis pli forta. Nun, ege grave estas pligi la produktadon.



LA STUDENTOJ EN LA PARADO DE NACIA FESTO

Kongresoj de Batal-herooj kaj Labor-modeloj

Ĉefkomandanto Ĉu Teh emfazis ke Ĉinio ankoraŭ staras antaŭ grava tasko liberigi Tajvanon kaj Tibeton.

"Ni devas esti singardemaj kontraŭ la riskoj de imperiismaj rabiaj hundoj kaj devas esti ĉiam pretaj defendi nian teritorion kaj suverenecon," li diris.

"Nur per la konstruo de potencaj popolaj armataj fortoj kaj firmanima opozicio al la enlanda kaj eksterlanda kontraŭrevolucia milito, la libereco de la nacio kaj la paco kaj feliĉo de la popolo pavas esti sekurigita. Tial la tasko antaŭ ni estas konstrui potencon kaj modernan defendarmeon kiu kapablas venki iun ajn agresanton."

Dum longaj minutoj kiam Prezidanto Maŭ Ze-tung iris sur la estradon, la delegitoj rifuzis sidigi. Ili staris kaj aplaudis kaj burais la arkitekton de Nova Ĉinio, la homo, kiu kondukis ilin al nova vivo de fiero kaj feliĉo. Kiam la Prezidanto finis paroli, reprezentantoj de diversaj delegitaroj

vortojn: "La heroo lukto de ĉinaj junuloj inspiras junulojn en ilia batalo," kaj aliaj memoraĵoj de amikeco kaj unueco.

Kiam la delegitoj eliris tra la densa amaso, ĉiuj rigardantoj premis sin antaŭen por tuŝi ilin kaj premi iliajn manojn aŭ doni ian esprimon pri sia varma amikeco.

Oni sentis, ke ĉi tie naskiĝas nova kaj pligranda unueco de la tutmondaj junuloj, kiuj alportos riĉan frukton por paco kaj socia progreso ambaŭ en Ĉinio kaj en iliaj propraj landoj, kiam la junul-representantoj reiros.

Espano Jam

iris al la estrado por prezenti al li flagojn kaj donacojn de la kampaj armeoj, arme-unuoj, fabrikoj kaj kampanaj organizoj.

Inter la grandiozaj silkaj flagoj bele broditaj estas multe da simplaj donacoj kiuj montras kiel sincere la viroj kaj virinoj de Ĉinio konsideras Prezidanton Maŭ Ze-tung kiel unu el inter si. Estis kompletoj da te-tasoj, kadrigitaj pentraĵoj, modelo de fabriko, kiu estis rekonstruita, kaj eĉ kelkaj boteloj da saŭco, kaj unu kampano alportis specimensakon da plibonigita semtritiko.

Parolante pri la internacia junula delegacio, Enrico Boccara, gvidanto de la delegacio, diris: "Vi ne nur servas la ĉinan popolon, sed ankaŭ la tutan progresivan homaron, ĉar vi laboras por la fortikigo de la pactendaro en kiu Ĉinio okupas gravan lokon. Via kongreso fortigos Ĉinion ekonomie kaj militite." En tondra aplaŭdado li konkludis: "Venko apartenos al ni, unuigitaj. Ni konstruos pacan, liberan kaj feliĉan novan mondon."

Delegitoj de la batalantoj, laboristoj kaj kampanoj garantiis ke ili ŝparos nenian penon por levi la normojn de la armataj fortoj, industrio kaj agrikulturo al pli alta nivelo kaj kondukos novajn milojn aktive en la taskojn de defendo kaj rekonstruado de la patrolando.

Yungsen

FONDIĜOS ĈINA ESPERANTO-LIGO

Post longtempa preparado nia tutlanda organizo Ĉina Esperanto-Ligo fondiĝos la 7-an de Februaro 1951 en Pekino. Estiĝos nova forto en la demokrata porpaca Esperantomovado. Tutmondaj geesperantistoj estas petataj sendi gratulleterojn grandnombre al: Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio.

Santempe Kun la Fondiĝa Kongreso de Ĉina Esperanto-Ligo estos aranĝata grandioza—

ESPERANTA EKSPOZICIO

en la komenco de Februaro 1951. Ĝi montros al la neesperantista publiko pri la praktika utileco de nia lingvo. Karaĵ gesamideanoj, helpu nin, kaj tuj sendu al ni multe da materialoj Esperantaj kaj priesperantaj: libroj, gazetoj, fotoj, bildoj, Esperantaj memorigaj poŝtmarkoj, bonenhavaj afiŝoj, prospektoj, kaj aliaj Esperantaĵoj. Al ĉiu sendinto ni rekompencos per materialoj samvaloraj kaj de li dezirataj.

Ĉina Esperanto-Ligo
P.O. Kesto 77,
Peking, Ĉinio

NOV-ĈINIA INDUSTRIO—LA UNUA JARO



Hodiaŭ, unu jaron post la fondiĝo de la Centra Popola Registaro, la ĉinaj laboristoj jam sukcese starigis la unuan mejloŝtonon sur la vojo al sendependa industrio servanta la popolon.

Ĉiam sekvante la malproksim-vidan Komunan Programon kiu akceptiĝis je la Popola Politika Konsiliga Konferenco en septembro 1949, ili jam iris konsiderindan vojon en la refunkciigo de peza industrio, kaj restarigo de teksa kaj aliaj malpezaj industrioj, kaj jam faris la unuajn paŝojn al baza plilongperioda plano.

Precipe okulfrapa estas la rapideco, je kiu la grave damaĝitaj industrioj en la gravega Nordoriento restarigis kaj disvolvigis. Karboproduktado—bazo de la tuta restariga programo—jam atingis 87 procentojn de la plej alta produktokvanto de 1944. Tio estis atingita, krome, per 50 procentojn malpli da ekipaĵoj en la operacio ol en 1944. La industrioj de fero kaj ŝtalo ĉijare elproduktis 1,600,000 tunojn da krudaj fero kaj ŝtalo. Ekzistas nun vere tute nova industrio de maŝinaj laboriloj.

Unu el la malpli elstaraj tamen fundamentaj triumfoj de ĉi jaro estas la konstanta alĝustigado de la industrio ne al la revo pri fremdaj merkatoj, sed al la garantio de la konstante kreskantaj enlandaj bezonoj. La ĉina industrio ĉefe estis konstruita de imperiistaj potencoj kaj kompradoraj kapitalistoj por servi ne la ĉinan popolon sed iliajn proprajn interesojn. Eksploatado por privata profito ĝin kondukis al malekvilibra disvolvigo. La ĉina industrio havis ĉiujn distingajn de kolonia aŭ duon-kolonia lando.

Karakterizaĵo de la nova disvolvigo en la pasinta jaro estas la ŝanĝiĝo en la koton-industrio. Kruda kotono ne plu bezonas esti importata grandskale el eksterlando por la fabrikoj, kiuj, tipe, estis koncentritaj de la imperiistoj en Ŝanhajo kaj ĉe la marbordo, for de ambaŭ la enlanda kotonproduktado kaj la eventuala enlanda aĉetado de la elfabrikitaj varoj. La produktado de kruda kotono; fakte, jam estas revivigita ĝis la punkto por konsideri pri estonta produkta superfluo por eksportado. Kaj en la lasta duono de ĉi jaro, 70 procentoj de la Ŝanhaja elfarita kotonŝtofo komplete adaptiĝis al la bezono de la ĉina kampularo.

Simile la malnova malakordo inter diversaj branĉoj de fer-kaj ŝtal-industrio estas firme eliminata. Industrio por indiĝenaj agrikulturaj ekipaĵoj estas kuraĝigitaj tra la tuta lando por kovri lokajn bezonojn. Tiaj fabrikoj en Ŝansi-Provinco produktos 12,000 akvoradojn en tiu ĉi jaro. Fabrikoj, kiuj produktadis militajn materialojn por Kuomintang ne longe antaŭe, nun estas klopodantaj por lokaj bezonoj de soko kaj aliaj terkulturoj. Fabrikoj de sterko, insektomortigilo kaj cemento elkreskas en kelkaj provincoj.

Sur la fundamento de politika potenco firme tenata en la manoj de la laboruloj, gvidate de la Ĉina Kompartio, la popola registaro ellaboris unuapasan planon je la komenco de ĉi jaro, koncentriganta je revivigado de industrio ĉe certaj gravaj punktoj. Ĝi planis la uzadon de nepre necesaj krudaj materialoj, hejtado kaj energio por esenca industrio. Ĝi asignis tiel multe kiel estis spareble el aliaj same bazaj taskoj por investado. Ĝi kunvokis dekojn da konferencoj por ensorbi ĉiun sperton kiu povus esti valora kaj elpetis la opiniojn de ĉiuj sekcioj de la popolo. Ĝi pruntedonis monon je malalta intereso al gravaj privataj industrioj kaj subskribis kontraktojn kun ili por fiksi longperiodajn mendojn.

Ŝtataj industrioj, gravega sektoro en la ekonomio, faris paŝon, kiu enpumpis novan vivon en ĉiujn aliajn industriojn kaj komerceojn. La mendoj fare de la registaro por novaj maŝinoj, ekzemple, atingis 70 procentojn de la tuta produktokvanto de la landa maŝinfabrika industrio.

En la tuta bildo, fervoja riparado kaj disvolvado okupas specialan lokon. En la pasintaj 12 monatoj, ĝi jam faris grandegan efikon al industria revivigo.

La unuan de januaro, 1950, la lasta plilonga fervojo-ĉeflinio de 2,300 kilometroj interliganta Pekinon kaj Kantonon, estis denove funkciigita. La unuan fojon en 13 jaroj, la tutlandaj ĉeflinioj estis en funkcio kaj la pasaĝeroj kaj ŝarĝoj povis veturi rekte de Manĉurio ĉe la landlimo de Siberio ĝis la plej suda landlimo de Ĉinio.

Ne nur rekonstruado, sed ankaŭ konstruado de novaj fervojlinioj estas komencita. La nova Ĉunking-Ĉengtua linio de 530 kilometroj alportos industrian kaj komercan prosperiĝon al la tuta Sudokcidento, ne nur pro mendoj de varoj necesaj por konstrui la linion kaj ĝiajn dependajn konstruojn sed ankaŭ pro la entreprenoj malfermiĝontaj anticipe de la disvolvigo komercado, kiun la nova fervojo alportos.

Tio, je kio la rekonstruo de industrio ĉefe dependas, estas tamen la plialtigo de la vivnivelo de la vastaj amasoj de la kamparanoj de Ĉinio. Kaj la unua paŝo en tio estas agrara reformo. La plibonigantaj vivkondiĉoj de la kampara loĝantaro ebligas kreskantajn disvendajn de la fabrikitaj varoj. Tial la disvendo de ŝtofo en Manĉurio ĉijare atingos naŭ milionojn da ruloj—trioble de la kvanto de la pasinta jaro kaj dekunuoble de tiu de 1947.

Alia grava faktoro por klarigi la paŝegojn faritajn ĉijare estas la helpo donita de Sovetiaj teknikistoj. Kvan-

kam kompare nemultnombraj, tamen ili jam malavare donis ĉiujn siajn spertojn akumulitajn dum 30 jaroj de Socialismo. Krome, Sovetunio provizis centojn da kilometroj da reloj kaj diversaj gravaj maŝinaj ekipaĵoj.

Sed la plej granda parto de la ŝuldo devas esti al la laborantaj amasoj de Ĉinio, kaj precipe al la laboristaro. Ilia gvidilo estis ilia intensa patriotismo kaj politika konscio kun la Komunista Partio plenumanta sian rolon de avangardo kaj gvidanto. En septembro de la pasinta jaro, komenciĝis la fama novrekorda movado, starigita de Ĉao Kuo-ju. En la 11-monata periodo finiĝinta en septembro, 21,740 novaj rekordoj estis faritaj en industrio de 64,000 laboristoj kolektive kaj individue. Je la fino de la periodo la ĉefa enfazo transiĝis de novaj individuaj rekordoj al novaj kolektivaj rekordoj, de pligo de labora intenseco al plibonigo de laboriloj kaj maŝinoj.

La membraro de Laboristaj Sindikatoj kreskis super kvar milionojn. Ĉi tiuj sindikatoj ludis gravan rolon en la enportado de demokratio en la fabrikojn. Komitatoj de laboristaj

reprezentantoj kaj komitatoj de fabrika administrado jam starigis en pli ol 1,000 el la pligrandaj fabrikoj kaj minejoj tra la tuta lando. Laboristoj partoprenas nun administradon en la ŝtataj fabrikoj kaj laborist-kapitalistan konsiligadon en la privataj industrioj. La nova Leĝo de Laborista Sindikato akceptita en julio surmetis la oficialan sigelon sur la aktualan pozicion de la laborista klaso de Ĉinio.

Kompleta asekura projekto estas jam efektivigata en la Nordoriento ekde julio de la pasinta jaro kaj jam duonmiliono da laboristoj kaj unu kaj duona milionoj da familianoj de laboristoj profitis el la sanprotektado donita kaj la pensioj por eksigintoj.

La laboristoj estas intensigantaj siajn penojn por respondi al la usonaj imperiistoj. La impresa rekordo de Ĉinio en tiu ĉi unua jaro de kompleta liberigo de la ĉeftero montras, ke ili scias kiel konstrui hejme dum ili gardstaras por frakasi ĉiujn intrigojn de la eksterlandaj imperiistoj.

—esperantigis Ver Kanto.



PEKINAJ LABORISTOJ EN LA PARADO DE LA NACIA FESTO

"NE MIN, SED UNUE LA VAGONARON!"

Pro memoro de la brave sin-oferinta, modela kompartiano k-do Liang Kuo-ĉu,

LEE

K-do Liang Kuo-ĉu (梁國柱) sin okupis kiel transŝarĝisto ĉe la gasolenejo de iu fervoja stacio. Li rigardis la gasolenekiel sian hejmon kaj tre zorgeme gardis ĝian sekurecon. Ĉar li ofte vidis venantan vagonaron ŝpruciganta fajrerojn apud la gasolenejo, li proponis al la gvidanto: "Estonte kiam venos vagonaro, antaŭ ĝian lokomotivon oni devos almeti kelkajn sensarĝajn vagonojn, ke la fajreroj ŝprucantaj el la lokomotivo estu pli malproksimaj de la gasolenejo, kaj ke fajro-akcidento, evitata."

Aliaj laboristoj ŝatis iri al teatro kaj kinejo dum libertagoj sed k-do Liang Kuo-ĉu timis, ke okazus akcidento se neniu gardis la gasolenejojn kaj tial li sola restis hejme por ĝin gardi.

Je la 21-a de marto de la kuranta jaro, li kun 8 laboristoj sinokupis je transŝarĝo de gasolen-vagonaro. Post la transŝarĝo ili komencis purigi la gasolen-pumilon. Por ke ne perdiĝu la restanta gasoleno en la pumpilo k-do Liang Kuo-ĉu estis ĝin plene elpumponta. Tiam li tenis en la manoj barelon por ricevi la gasoleno el la buŝo de la pumpilo. Li petis laboriston Jen Teng-ĉang (任登章) alpuŝi la elektrokumutilon. Sed ĉar Jen ne estis sufiĉe lerta en la tekniko kaj ĝin alpuŝis malrapide, el la elektrokumutilo elŝprucis fajreroj. Tiam la elektrofluo jam funkciigis la pumpilon kaj subite elpuŝis la restantan gasoleno, kiu ŝprucis sur la tutan korpon de k-do Liang Kuo-ĉu. Kaj ĉar tiutage blovis ventego, ĝi miksis la elŝprucigitajn fajrerojn kaj gasolensauĉmojn, kiu tuj ekbrulis. Kaj ankaŭ ekbrulis la vestoj de k-do Liang Kuo-ĉu kaj la gasoleno en la barelo. El la barelo elsaltis flamo 5-6 metrojn alta. Se ĝi ektuŝus

la vagonaron plenan de gasoleno, pensis k-do Liang Kuo-ĉu, sendube estiĝus eksplodo kaj fajrego. Kaj ĉion spitante li fluge ekkuris portante la barelon. La laboristoj vidis ke li estas tute en flamo, kun brulanta barelo en la manoj kaj brulantaj vestoj sur la korpo. Ĉiuj volis alveni por lin savi, sed li diris:

"Ne zorgu pri mi, sed rapide estingu la fajron apud la vagonaro!"

Li forkuris 50-metrojn kaj nur tiam forĵetis la barelon. Tiam liaj manoj jam karboniĝis kaj la brulado de la vestaĵo pli furioziĝis. Li svenis kaj falis surteren.

La laboristoj per sia tuta forto en 5-6 minutoj estingis la furiozan fajregon apud la vagonaro. Tamen kiam ili reiris por savi k-don Liang Kuo-ĉu, li jam deformiĝis en la brulado. Ĉiuj rapidis forŝiri lian brulantan vestaĵon. En la sveno li ankoraŭ baraktis krii:

"Ne savu min, savu la gasoleno-vagonaron! Ĝi estas ja gasoleno-vagonaro de la popolo!..." Kaj tiel li savis 16 vagonojn da gasoleno, kaj la gasolenejojn de la stacio.

La laboristoj rapide portis k-don Liang-Kuo-ĉu en aŭton kaj sendis lin al hospitalo. Post ekzameno la doktoroj opiniis ke la brulvundo estis tro grava kaj malfacile kuracebla. Tamen ili ankoraŭ metis senliman esperon en la fidela kaj honora filo de la laboranta popolo—k-do Liang Kuo-ĉu, kaj volis ke la heroo daŭre vivu kaj pli multe laboru por la popolo. Fojon post fojo oni al li injektis medikamenton por savi tiun ĉi heroon. Fine post longaj kaj maltrankviligaj horoj iom konsejiĝis k-do Liang Kuo-ĉu. Pro tio ĉiuj ĝojis. En la vespero la laboristoj alvenis lin

vidi. En duonsveno li ankoraŭ de- mandis, ĉu estingiĝis la fajro. Li diris kun rideto:

"Estas negrave, ke mi mem mortos. Nur atentu savi la publikan gasoleno-vagonaron!"


Kaj kun substreko li konsilis la kamaradojn:

"Poste dum laborado oni devos speciale atenti, kaj ne plu estu senzorgemaj, ĉar tio estas tre danĝera."

En tiu sama nokto ĉi tiu eminenta kompartiano k-do Liang Kuo-ĉu, brulvundite en protekto de ŝtata havaĵo, finfine mortis pro nekuracebla grava vundego.


K-do Liang Kuo-ĉu estis laborist-devena. Li laboris 7 jarojn kiel arbohakisto kaj 4-5 jarojn kiel transŝarĝisto. Li posedis la bonajn kvalitojn kaj noblajn virtojn de laboruloj: ami la patrolandon, la popolon, la laboradon. Tial li ĉiam pozitive respondecis en la laboro, kaj bone unuiĝis kun la laboristoj por kune progresi. En decembro de la pasinta jaro li aliĝis al la Komunista Partio kiel kandidata partiano. Post lia sinofero, la loka kompartia komitato opiniis, ke li jam havis la noblajn kvalitojn de kompartiano: fidela al la Partio, al la laboro kaj al la popolo, kaj speciale decidis aprobi lin postmorte oficiala kompartiano de Ĉina Komunista Partio, kaj donacis al li la honoran titolon de modela kompartiano.

Trad, Zekun



KAMPARANOJ EN NOVA ĈINIO

Teh Kao



Feŭdismo Renversita

La deklaracio de Prezidanto Maŭ Ze-tung (毛澤東) je la establo de la Ĉina Popola Respubliko laŝtan oktobron sonorigis la morton de feŭdismo, kiu dum pli ol du mil jaroj malhelpis la disvolvigon de la grandaj latentaj riĉfontoj de la vastaj regionoj en Ĉinio. La ĉinaj kamparanoj, kune kun la ĉinaj laboristoj, jam starigis kaj iris malproksimen dum la unua venka jaro de la ĉina revolucio. Ili ricevis sian pecon da tero aŭ malpliigon de lupago kaj interezo antaŭ la efektiviĝo de la distribuo de tero. Sekve, ili montras grandan entuziasmon en plialtigo de agrikultura produkto, kiu estas la bazo por la industriigo de la lando.

La nombro de popolo kaj la grandeco de la areo implikataj en la agrara reformo signifas, ke ĝi estas socia leviĝo en la kamparaj regionoj senprecedenca en la historio de Ĉinio kaj la mondo. Nun, 145 milionoj da kamparanoj jam komplete abolis la jugon de feŭdismo. La vasta areo, kie agrara reformo jam efektiviĝis ampleksas preskaŭ 3,198,000 kvadratajn kilometrojn, aŭ kvin kaj duonan oblojn de la grandeco de Francio. En la vintro de 1950 efektiviĝis agrara reformo, en alia areo ampleksanta 100 milionojn da kamparanoj en nove liberigitaj Centra-Suda kaj Orienta Ĉinio kaj partoj de Norda Ĉinio kaj Nordorienta Ĉinio kie revolucia ordo firmiĝas kaj la plimulto de la kamparanoj jam elmetis sian postulon por tero kaj kie sufiĉe da kapablaj kadroj estas trejnitaj por efektiviĝi tian reformon. Tio levas la nombron de kamparanoj sin liberigintaj de feŭda ekspluatado ĝis 245 milionoj, aŭ 60% de la tuta kampara loĝantaro en Ĉinio. En la pli granda parto de la areo loĝata de la restantaj 164 milionoj da kamparanoj, agrara reformo efektiviĝis post la aŭtuna rikolto de 1951. En tri jaroj agrara reformo kompletigos tra tuta Ĉinio.

Agrara reformo liberigas la longe limigitan latentan produktivon de la kamparaj regionoj. Tipaj el la vilaĝoj, kiuj jam montras signojn de esencaj

ŝanĝoj post la agrara reformo, estas Ŝikocun (西溝村), fora vilaĝeto en Ŝansi-Provinco (山西省). Jen kion la vilaĝanoj skribis al Prezidanto Maŭ Ze-tung en 15. majo, ĉijare:

“Antaŭ la agrara reformo, nur du el la dudek familioj en nia vilaĝo havis sufiĉe por manĝi. Nun ni ĉiuj havas teron, kaj la tuta vilaĝo havas 6,500 kilogramojn da ekstraj nutraĵoj. Nia nuna rikolto estas 50 ĝis 100 procentoj super tio antaŭ milito. La nombro de tir-brutoj en la vilaĝo pliiĝis de 18 ĝis 39 kaj la nombro de ŝafoj pliiĝis de 50 ĝis 120.”

La letero ankaŭ citas la vortojn de kamparano Vang Se-ze (王四則): “Mia familio tiam vivis de brano kaj legomoj kaj vestiĝis en ĉifonoj. La tuta familio uzis unu solan litkovrilon, dum la domo estis nenio pli ol barilo el maizaj trunketoj. Nun, ĉiu el ni havas koton-litkovrilon kaj koton-vatitan jakon por la vintro. Ni konstruis tri novajn ĉambrojn al nia domo. Ni neniam forgesos Prezidanton Maŭ.”

Prospero per Laboro

La entuziasmo de la kamparanoj altiĝas ĉie. Ili popularigas la sloganon “prospero per laboro” kaj konstante aplikas novajn rimedojn por pliiĝi produkton. “Interhelpaj teamoj”, ludas gravan rolon en altigo de agrikultura produktivo. Per komuna uzado de hompovo, iloj kaj tir-brutoj kaj per planita divido de laboro, la laborefikeco de la kamparanoj pliiĝas kvarone aŭ duone. Plejparto de la tero estas sarkata tri aŭ kvar fojojn. Por certigi bonan rikolton, la kamparanoj nun povas apliki pli da fekundigilo ol iam ajn. Ekzemple, en unu el la vilaĝoj en norda Kiangsu (江蘇), la vilaĝanoj uzis kvaroble la kvanton de sterko po muo kiu estis iam uzita.

“Interhelpaj teamoj” ankaŭ vaste uzas modernigitajn farminstrumentojn kiel ĉevaltiritaj plugiloj, erpiloj, rikoltiloj, dekveicaj semiloj kaj aliaj farmmaŝinoj. Ili akiras ĉi tiujn ilojn je modera prezo el la ŝtatfunkciataj fabrikoj kie ili pagas amortize.

Semselekto estas ankaŭ unu el la gravaj faktoroj de riĉa rikolto. Multaj kamparanoj en la provincoj de Ĉahar (察哈爾), Sujjuan (綏遠), Hopej (河北),

REKORDO-ROMPANTO ĜIA CUN-VEN

Kiam krepusko ekregis super la regiono apud Flava-Rivero (黃河) en Pingjuan-Provinco (平津省), digkonstrua laboristo Ĝia Cun-ven (賈崇文) des pli vige enfosis la grundon. Apud li staris amaso da kamparanoj kaj homo en kadra uniformo, kiu tenis en unu mano horloĝon kaj en la alia notkajeron.

Ŝia, fortikulo ĉirkaŭ 40-jara, firme tenis per ambaŭ manoj la tenilon de pioĉo kaj svingis ĝin kun sia plena forto kontraŭ la enfosaĵo. Je ĉiu frapo pecegoj da malmola tero defalis. Kiam sufiĉe da terpecegoj estis defaligitaj li rapide ŝovelis ilin en ĉaron, forpuŝis ĝin al digo, ĉirkaŭ 70 metrojn for, kaj malplenigis ĝin de la ŝarĝo. Tiam li rapide revenis al la kavaĵo kaj denove ekfosadis.

Je la 7a vespere, la uniformulo petis lin ĉesi labori. Sumigante figurojn en sia notkajero, li anoncis: “Ŝia Cun-ven hodiaŭ demovis 28 kubmetrojn da tero. Tiorompas ĉiujn antaŭajn rekordojn”. La amaso eksplodis en huraoj kaj aplaŭdoj. Ŝia ridetis naive, viŝante la ŝviton sur sia sun-brunigita vizaĝo per ambaŭ manikoj.

La nomo de rekordo-rompanto Ŝia Cun-ven rapide disfamiĝis. “Atingu la rekordon de Ŝia” fariĝis populara slogano inter dekmiloj da kamparanoj en kelkaj provincoj, kiuj laboris por konkeri la Flavan Riveron. Inspirite de Ŝia, multaj plialtigis sian ĉiutagan kvoton super la fiksitaj normo de 10 kubmetroj.

Pri Ŝia Cun-ven, pli rimarkinda ne estis la kvanto de tero kiun li povis movi en unu tago, sed la mirinda laborentuziasmo de li elmontrita.

En 1947, kamparano Kaŭ Fa-ĉeng, (高法成) el iu malnova liberigita regiono, kreis novan rekordon, transportante 14.2 kubmetrojn da tero

potage. Tiam multaj suspektis la kredeblecon de la raporto. Lastan jaron tamen Vang Cuan-ŝin (王傳信) kaj Vang Cuan-ĉia (王傳家), du fratoj el Pingjuan-Provinco, atingis eĉ pli altan rekordon de 18 kubmetroj. Nun Ŝia Cun-ven faris 28, kaj lia rekordo estis oficiale konfirmita de inspektaro.

Ŝia iam elpensis kelkajn plibonigojn sur siaj instrumentoj, kaj enkondukis kelkajn novajn metodojn de laborado. Tamen la iloj kiujn li uzis ankoraŭ estis tre krudaj kaj lia tekniko estis apenaŭ malpli postlasita. Tio kio sukcesigis lin kompreneble estis lia entuziasmo—spirito tiel reprezentiva de ĉinaj emancipitaj kamparanoj hodiaŭ.

“Mia atingo ne estas miraklo”, poste klarigis Ŝia ĉe amaskunveno, kie oni premis la elstarantajn konstruintojn “En la pasinteco malriĉuloj kiel mi, vivis kiel porkoj kaj hundoj. Ĝu inundo, ĉu ne, mi neniam havis sufiĉe por manĝi kaj des malpli por esperi. Kial do mi min ĝenus labori diligente? Tiam laborante sur digo mi nur demovis unutage du aŭ tri kubmetrojn.”

“Sed nun mi havas ses muojn da agro. Kiam ajn, mi pensas pri la belajn verdajn kreskaĵojn en miaj propraj kampoj, mi ektimas ke inundo ilin detruos. Mi ja ne povas min deteni de penema fosado. Cetere mi lernis de la kadroj en mia vilaĝo, ke por fari nian landon prospera, ĉiu homo devas bone fari sian parton en la laboro. Mi opinias ke per pli diligenta fosado ĉi tie kaj pli bona rikolto hejme mi ankaŭ iom kontribuas.

elĉinigita de Nash.



Pingjuan (平津), Honan (河南), Ŝantung (山東), Anhuej (安徽), Kiangsu (江蘇), Ĉekiang (浙江), kaj Fukien (福建) vizitas la ŝtatfunkciatajn semkompaniojn kaj intersanĝas siajn ordinarajn semojn por pli bonkvalitaj semoj aŭ akiras bonajn semojn kredite.

Pliiĝitaj rikoltoj rekompencas la penojn de la kamparanoj. Ekzemple, en vilaĝo Ŝihotun (西河屯), Nordorienta Ĉinio, en 1947, la tuta rikolto de la vilaĝo estis 45 tunoj. Lastjare ĝi estis 130 tunoj. Ĉijare oni supozas ke ĝi atingos 225 tunojn.

La tuta tritikprodukto tra la lando en la somerrikolto de 1950 estas taksata je ĉirkaŭ 20 milionoj da tunoj aŭ 3,300,000 tunojn pli ol la tritikprodukto de lasta jaro.

Produkto de sensemigita kotono estas taksata je 735,000 tunoj. Tio estas sufiĉa por kontentigi la bezonon de ĉina teksa industrio en la venonta jaro.

La ciferoj por la kvanto de ŝtofo vendita en Nordorienta Ĉinio klarigas, kiel pli bonaj kondiĉoj de la kamparanoj kreas ĉiam vastiĝantan merkaton por industrio. La kamparanoj aĉetas pli da industriajn varojn dum pagas malpli da grenimposto al la registaro. La vendo de ŝtofo ĉijare, oni taksas, atingos 9,000,000 rulojn, dum en 1948 1,200,000 rulojn kaj en 1949 3,200,000 rulojn. Antaŭ du jaroj la kamparanoj konsideris sin feliĉaj akiri maldelikatan blankan ŝtofon por siaj someraj vestoj. Nun ili postulas pli delikatan kaj

ĉarman desegnitajn ŝtofon precipe por la junuloj.

La konstanta altigo de politika konscio de la ĉinaj kamparanoj estas videbla en la ĉiam kreskanta nombro de kamparanaj asocioj starigataj tra la lando. La membraro de ĉi tiuj asocioj en la regionoj de Orienta Ĉinio kaj Centra-Suda Ĉinio estas jam super 30 milionoj. En aliaj regionoj, la nombro ĉiutage kreskas. Ĉi tiuj kamparaj asocioj ludis kaj ludas gravan rolon en efektiviĝo de la agrara reformo kaj altigo de produkto.


Preta por Defendi Sian Landon kaj Mondpacon La ĉinaj kamparanoj, kiuj akiris liberon sub popola registaro, nun uzas sian tutan forton en disvolvo de sia malfacile akiritaj fruktoj de venko. Ili estas konscia pri sia rolo en la firmigo kaj konstruo de nova Ĉinio. Ili estas pretaj por defendi sian patrolandon kaj mondpacon. Ĉie, grandaj nombroj da kamparanoj subskribas la Stokholman pacalvokon. “Ju pli da subskriboj ni kolektas, des pli bone gardataj estos la fruktoj de nia penado” jam fariĝis komuna diro inter la kamparanoj. Ili scias kiel kontribui sian parton al la defendo de mondpacon. Antaŭa malriĉa kamparano Ĉao Ŝih-lu (趙世祿), de Ĉuticun (朱堤村), vilaĝeto en Pingjuan-Provinco, esprimis la firman volon de la tuta ĉina kamparano kiam li diris: “Ni defendas mondpacon per niaj plugiloj!”

Tradukis Venlo Føn.



LA KAMPARANINOJ ĜOJE AĈETAS BEZONAĴOJN

Ŝia Feng



LIANG KJUN SUR SIA TRAKTORO EN ŜTATA FARMO DE NORD-ORIENTA ĈINIO

La Unua Virina Traktorista Trupo en Ĉinio

Ĉang Ĉen-ji (張振義)

*"Jen, traktoroj de ni,
kun plugiloj post si.
ekplugas sur la stepo senlima.
Ni estas de produkto la energi,
plugu, plugu,
tra la kamparo de nia patri!..."*

—La kanto de traktor-veturigistinoj.

Je la 3-a de junio, 1950, fondiĝis la Virina Traktorista Trupo en kolhozo de Instruista Lernejo de Mengja-Vilaĝo (萌芽鄉), Tetu-Urbo (德都縣), Hejlunkiang-Provinco (黑龍江省). En Ĉinio ĝi estas la unua traktorista trupo virina.

En tiu ĉi trupo troviĝas kvin konduktoroj, kvin helpantoj, kaj unu kultura direktoro. Ili kondukas tri traktorojn. Liang Kjun (梁軍) estas trupestro, Vu Ju-ĉen (吳玉珍) estas kultura direktoro, kaj la ceteraj estas Tien Ŝu-fang (田淑芳), Ĉen Ja-ĵu (陳嘉茹), Ĉen Jen (陳彥), Huang Kuj-ĉen (黃桂珍), Liu Ŝu-sin (劉淑新), Sun Ing-sin (孫迎新), Sung Jung (宋榮), Ho Siu-fang (何秀芳), kaj Ĉang Feng-jen (張鳳燕).

Majon, 1948, Liang Kjun ellernis la lecionon de Traktora Kurso de Pej'an (北安), kaj revenis al Instruista Lernejo de Mengja-vilaĝo alkondukante traktoron. La kamaradoj ŝin renkontis tre ekscitite. Tiam Ĉen Ja-ĵu estis ege kortuŝata, kaj arde volis lerni konduki traktoron, por labori por konstruo de la patrio. Liang Kjun ŝin helpis paciencie. En printempo de lasta jaro, Ĉen Ja-ĵu aliĝis al traktorista trupo ĉiutage venis en vento kaj iris sub pluvo, tusante pro fumo, ŝvitante pro varmo de la maŝino, kelkfoje eĉ noktis en la kampo... kaj tra lernado persista, ŝi finfine ellernis tiun ĉi teknikon.

Kiam disvastiĝis la novaĵo, ke Ĉen Ja-ĵu povas konduki traktoron, Tien Ŝu-fang, Ĉen Jen kaj Huang Kuj-ĉen post interkonsiliĝo ankaŭ aliĝis al la traktorista trupo.

Estis aŭtuno. Ripozante en kampo,

ili sidis inter avelarbedoj kaj aŭskultadis la klarigon de Liang Kjun pri la principo de la maŝino. Traktoroj tondras tage kaj nokte, kaj ankaŭ ili lernadas streĉe tage kaj nokte.

Kiam la Ĉina Popola Respubliko fondiĝis, la lernejestro kamarado Kaŭ Heng (高衡) kuraĝigis ilin lerni diligente dirante: "Antaŭen marŝu brave sub la kvinstela ruĝa flago, konstruu nian patrion kun senlime bela estonto!" La gvidantaj kamaradoj prizorgas ilian progreson kaj sanon. La estro ofte atentigas inĝenierojn: "Instruu paciencie, zorgu ilian sanon." En lernado, ili ne volas ripozi pro malsaneto. La estro kaj kamaradoj urĝigas ilin iri sin kuraci, ne lasis ilin fari pezan laboron en malsano. Tiel ili lernadas pli decide kaj diligente.

Lastvintre dum tritikorikolto, la temperaturo restis pli ol 30° sub glaciiga punkto. Ili kvin, same kiel viraj kamaradoj, laboradis penege en la malvarme, kaj, kvankam kun manoj

...

LA FINO DE 200-JARA KONFLIKTO

Ekde la konstruado de la 150 kilometrojn longa Huang (皇)-Kanal en la seka Provinco Kansu (甘肅) antaŭ 200 jaroj, la terkultivistoj apud la kanalo ricevis limigitan akvoprovizion por irigacii siajn grenkampojn. Sed ili renkontis senfinajn ĉagrenojn pro tiu ĉi kanalo.

Ĉiujare dum la sezono de semado, la bienuloj kaj riĉaj terkultivistoj apud la supra parto de la kanalo tenis vaste malfermitaj ĉiujn pordojn kaj subterajn defluilojn laŭ la bordo de la kanalo, enfluigante tiom da akvo en siajn kampojn kiom ili povis. La terposedantoj en la malsupra parto kompreneble koleriĝis pri tio, ĉar la akvoprovizo estis rapide elĉerpita. Kvereloj konstante okazis kaj rezultis ofte armitaj konfliktoj. La riĉuloj kiuj kontrolis la pordojn kaj subterajn defluilojn ĉiam restis malantaŭ la scenejo dum la kvereloj, instigante kaj devigante siajn malriĉajn farmistojn

frostvundiĝintaj, ankoraŭ ne volis ripozi.

La rapideco de ilia progreso estis neatendita. Ĉi tiun januaron, okazis ekzameno de traktor-kondukado. Ĉen Ja-ĵu manipulis sur kondukista sidejo, apud ŝi sidis la inĝeniero. Kiam ŝi atingos akutan vojkurbon, ĉiuj timis por ŝi. La radoj krakadis, la motoro tondras surdige, ŝi estis iomete maltrankvila. Sed, dank' al la sperto akirita en lernado dum pli ol ok monatoj, ŝi tiris aplombe kelkfoje la "oleopordon" kaj trairis facile. Post ĉi tiu ekzameno, ŝi fariĝis kondukisto. Tien Ŝu-fang kaj Ĉen Jen, kiuj lernis kvin monatojn, fariĝis unuagradaj helpantoj, kaj Vang Kuj-ĉen fariĝis duagrada helpanto.

Post ekzameno, ili deklaris sian decidon fariĝi konduktoroj en ĉi tiu printempo. Helpante unu la alian, ili lernas diligente. En Marto, Liang Kjun revenis de Azia Virina Kongreso, la trupaninoj elkuris el la traktorejo manpremis kun ŝi per manoj malpurigitaj de petrolo, kaj ŝin demandis admire: "Ĉu vi vidis Prezidanton Maŭ?"

Ili forprenis unu de la alia por legi unue la ilustritajn gazetojn, kiujn Liang Kjun alportis de la kongreso. Ekvidante la feliĉan vivon en kolhozoj

de Soviet-Unio, kaj ekvidante Angrinan la unuan virinan traktor-trupestron de Soviet-Unio, ili ekscitite imagis antaŭ si belegan estonton de Nova Ĉinio.

Je la 8-a de marto, la festtago de virino, ili petis al la superuloj organizi trupon de virinaj traktoristoj. Tiam la superuloj ne akceptis la proponon, pripensante ke traktor-konduktorinoj estas ankoraŭ malmultaj, kaj ilia tekniko ankoraŭ ne sufiĉe lerta. Sed nun, aliĝis plue kvin fortaj junulinoj, kaj Tien Ŝu-fang, Ĉen Jen kaj Huang Kuj-ĉen ankaŭ fariĝis konduktoroj. Tial je la 3-a de junio, post ceremonio, fondiĝis la traktoristina trupo.

La duan tagon, la traktor-konduktorinoj, sidante en tri traktoroj ekkuris sur la senlime vasta stepo. Antaŭ la konduktora kajuto staris ruĝa flago, kiun, al ili donacis la Partio kaj la registaro, kaj la maŝinoj estis plene ornamitaj per diverskoloraj sovaĝaj floroj. La traktoroj tondris daŭre, ruĝflagoj flirtis en vento, kaj la konduktorinoj kantis en unu voĉo:

*"Ho! Fajrplugilo, vi ŝtala militĉevalo,
fajrplugilo, nia kara amiko en batalo.
Estas tempo por ekplugi,
ĝoje sonoradas vi.
Ni tra tuta la kamparo,
kuras per ĉevalo de di!"*

Trad. Ly Moje.

...

Tial ni finu tian malsaĝan aferon. Interbatalu la bienuloj, se ili volas." Liaj vortoj reprezentis la ĝeneralan sentimenton.

Sen ĉesto de bienuloj kaj riĉaj terkultivistoj kiuj ĉiam incitis konflikton inter laborantaj terkultivistoj kaj tenis ilin dividitaj, la interpaciga kunveno facile kondukis al konsento. Simpla regulo estis akceptita: la supra parto kaj la malsupra parto malfermos siajn kanal-pordojn alterne por samlonga tempo ĝis kiam la akvo elĉerpiĝos.

Ĉi tiu aranĝo funkciis glate en lasta printempo. Nun la terkultivistoj de la Huang-Kanal estas okupitaj de putofosado kun la helpo de la pruntita mono de la registaro, ĉar ili konstatis ke, antaŭ ĉio, nur aldonita akvoprovizo povas fundamente solvi iliajn problemojn.

Ĉ. L.

LU SIN ĈIAM EN NIA MEMORO

Lu Sin (魯迅) naskiĝis la 3-an de aŭgusto, 1884 en Ŝaŭsing (紹興), Ĉekiang-Provinco (浙江省). Lia patro estis edukita homo kaj havis iom da tero. La patrino devenis el provinca familio kaj post memlernado ŝi povis deĉifri kelkajn ideografojn. La havaĵo de la familio estis sufiĉa por akiri la ĉiutagan manĝaĵon. Kiam Lu Sin havis dektri jarojn, katastrofo atakis la familion kaj ili perdis preskaŭ ĉion. La malriĉeco devigis Lu Sin vivi ĉe iu sia parenco, kiu insultis lin kvazaŭ almozulon. Pro tio Lu Sin forlasis sian provizoran hejmon. Dum tiu tempo lia patro grave malsaniĝis kaj mortis post tri jaroj. Lu Sin vivis kun sia patrino. Ŝi sendis la filon al senpaga lernejo.

Lu Sin havis dekok jarojn kiam li veturis al Nanking. Li aliĝis tie al la Marista Instituto kaj lernis teknikon. Poste li studis ĉe la Mineralogia Instituto. Diplomito, li iris al Japanio por plua studado, sed gradigite de 1^a prepara lernejo, li decidis esti kuracisto, ĉar laŭ lia observo medicino multe helpis la prosperon de la insulando. Li studis du jarojn en la medicina kolegio de Sendaj. Tiam eksplodis la rusa-japana milito. Hazarde li vidis en filmo ekzekuton de forta sed stultaspekta ĉino fare de la japanaj invadantoj kaj ĉirkaŭrigardata de egale fortaj sed stultaspektaĵoj ĉinoj. Post tiam li pensis, ke medicino ne estas tiel grava kiel literaturo, per kiu oni povas ŝanĝi la spiriton. Tial li sin dediĉis al literaturo. Li forlasis la universitaton kaj transloĝiĝis al Tokio. Kaŭzoj familiaj devigis lin reveni al Ĉinio.

Li instruis kemion kaj fiziologion en la seminario de Hangĉou (杭州), Ĉekiang-Provinco. Post unu jaro li fariĝis vicedirektoro de 1^a Ŝaŭsing-mezlernejo, sed li forlasis ĝin post duonjaro. Post la starigo de 1^a Ĉina Respubliko li laboris en la ministerio por edukado en Nanking kaj poste en Peking. Li instruis literaturon en diversaj universitatoj. Lu Sin devis forlasi la urbon pro politikaj persekutoj en 1926; li iris al Amoj (廈門) kaj Kantono (廣州). Li rezignis sian postenon en Sun Jatsen-Universitato pro elpelo de progresemaj studentoj fare de la reakciuloj en 1927 kaj iris al Ŝanhajo (上海) kaj sin dediĉis tute al literaturo. Li mortis la 19-an de oktobro, 1936, en Ŝanhajo.

Liaj noveloj kolektiĝis sub la titoloj *Kriado kaj Vagado*. El ili la plej konataj estas *La Vera Historio de Ah Q*, *Medikamento*, *Beno*, *Eksedziĝo*, *En la Drinkejo*, *La Soleca Homo*, *Kung Ji-gi* kaj aliaj. *Sovaĝaj Herboj* estas liaj kolektitaj

poemoj en prozo. *Matenaj Floroj Vespere* kolektitaj estas rememoroj el liaj junaj tagoj. *La Legendoj Rerakontitaj* konsistas el historiaj skizoj. Gravaĵo ankaŭ estas liaj eseoj batalemaj. Se ni volas kompreni la evoluon de la penso de Lu Sin, ni devas ankaŭ legi liajn eseojn.

Lu Sin estis realisma, fidela al siaj ideoj, konscienca kaj celkonscia. Li ĉiam subtenis la sistemojn plej progresemajn ideojn kaj li mem ĉiam progresis. En sia literatura laboro, komence li enkondukis verkojn de subpremataj popoloj de Nordeŭropo kaj vokojn de aliaj revoluciaj poetoj kaj li mem ankaŭ 'kriis'. Tamen el sperto li komprenis, ke malmulte rezultigos, se oni batalas sola. Li serĉis kunbatalantojn inter junuloj. Sekve li helpis la junulojn de Nenomita Asocio (未名社) traduki Sovetiajn verkojn, kaj dume li mem ankaŭ legis marksismajn librojn. Tio komenciĝis jam longe antaŭ ol li forlasis Peking por Amoj en 1926. Kontaktante kun la granda revolucio de 1927. Lu Sin des pli fidis je la gvido de la proletaro kaj tutkore kaj fidele batalis ĝisfine sub ĝia gvido. Malgraŭ ĉiaj subpremoj de la malamiko li kuraĝe staris en la tendaro de la Ligo de Maldekstraj Verkistoj. Pere de ĉi tiu Ligo li tutkore akceptis la gvidon de la Ĉina Komunista Partio.

Sub ties ĝusta gvido lia tuta laboro ne plu estis lia privata esprimo, sed estis en la granda ĥoro unuanima de la tuta ĉina popolo.

"Lu Sin estis la ĉefa generalo de ĉina kultura revolucio. Li estis ne nur granda literaturisto, sed ankaŭ granda pensulo kaj granda revoluciisto. Lia osto estis la plej malmola. Ĉe li estis neniam da sklavemo kaj flatemo. Tio estas la plej valora karaktero de la popolo de kolonio aŭ duonkolonio. Sur la kultura batalfronto Lu Sin estis la plej kuraĝa, plej decidema, plej fidela, plej fervora senprecedenca nacia heroo, reprezentanta la plejmulton de la tuta nacio kaj ŝturmanta kaj konkeranta poziciojn de la malamiko. La direkto de Lu Sin estas la direkto de la nova kulturo de la ĉina nacio." (Maŭ Zetung).

RED.



Lu Sin

KUNG JI-ĜI

LU SIN

La interna aranĝo de drinkejoj en la urbeto Lu estas malsama al tio aliloka: kontraŭ la strato troviĝas ĉiam L-forma granda montrotablo, malantaŭ ĝi estas pretigita varma akvo, en kiu oni povas iam ajn varmigi vinon. Laborantoj, fininte sian matenan aŭ tagan laboron, ofte elspezas kvar kupromonerojn por aĉeti tason da vino—tio estis prezo antaŭ pli ol dudek jaroj, nun por ĉiu taso ĝi altiĝas ĝis ĉirkaŭ dek moneroj—kaj starante antaŭ la montrotablo, ĝin trinkas dumvarme por sin refreŝigi. Se oni volus elspezi alian moneron, oni povus aĉeti telereton da salita bambuĝermo aŭ fenkol-faboj¹⁾ por manĝi kune kun la vino. Kaj se dekkelkajn monerojn oni elspezas, oni povas ricevi jam teleron da manĝaĵo kun viando. Sed multaj el tiuj ĉi klientoj estas mallongvestuloj kaj ne povas esti tiel luksemaj. Nur robuloj povas enpaŝi la najbaran drinkĉambron, mendi vinon kaj manĝaĵojn kaj ilin trankvile ĝui tie sidante.

De kiam mi estis dekdujara, mi servas kiel kelnero en Sianheng-Drinkejo ĉe la enirejo de la urbeto. La drinkejmastro diris, ke mi estas tro stultaspekta, eble ne pevas servi la robportantajn klientojn, kaj ke mi ion faru ekstere. Sed senfine babiladis ne malmultaj el la eksteraj klientoj mallongvestaj, kvankam ili estis facile trakteblaj. Ili ofte ne trankviliĝis, ĝis kiam ili proprukule observis la flavan vinon verŝiĝi el botelego, kontrolis ĉu estas akvo en la fundo de kruĉo, kaj proprukule vidis ke oni la kruĉon metas en varman akvon por ĝin varmigi. Sub tia severa kontrolo, estis tre malfacile enmiksi akvon. Tial post kelkaj tagoj la drinkejmastro denove diris, ke mi ne povas ĉi tion fari. Feliĉe la rekomendo estis influa, kaj ne estis eble min maldungi, tiam la seninteresa drinkaĵvarmigado fariĝis mia tasko.

De tiam mi tuttage staris interne de la montrotablo kaj prizorgis nur mian taskon. Kvankam mi ne fuŝis mian taskon, mi sentis iom da monotono kaj enuo. La drinkejmastro estis ĉiam kun mieno severa kaj la klientoj ankaŭ malafable min alparolis. Tute ne estis eble por mi vigliĝi. Mi povis iom ridi, nur kiam Kung Ji-ĝi alvenis. Tial lin mi ankoraŭ memoras ĉe nun.

Kung Ji-ĝi estis la sola homo, kiu drinkis starante kaj tamen portis robon. Li estis altastatura, kun vizaĝo pala, sur kiu ofte troviĝis vundeikatoj inter la faltoj, kaj kun barbo taŭzita kaj griza. Kvankam li portis robon, tamen ĝi estis malpura kaj eluzita, kvazaŭ ne flikita kaj ne lavita jam pli ol dek jarojn. Kiam li parolis, li ĉiam uzis la vortojn 'ĵi, hu, ĵe, je, je²⁾' ke oni lin duone komprenis kaj duone ne. Ĉar lia familia nomo estis Kung, oni prenis por li la moknomon Kung Ji-ĝi el la duonkomprenebla frazo, 'Ŝang ta-ĵen, kung ji ĝi³⁾' en skribmodelo. Kiam Kung Ji-ĝi alvenis, ĉiuj drinkantoj ekridis lin rigardante kaj kelkaj kriis,

"Ho, Kung Ji-ĝi, aldoniĝis denove novaj cikatroj sur via vizaĝo!" Tion li ne respondis, sed diris al iu malantaŭ la montrotablo, "Varmigu du tasojn da vino kaj alportu unu telereton da fenkol-faboj." Tion dirinte li elmetis vice naŭ monerojn sur la tablon. Ili intence laŭte kriis, "Certe vi denove ŝtelis." Large malferminte la okulojn Kung Ji-ĝi diris, "Kial vi tiel senbaze mian senkulpecon makulis?...?" "Kia senkulpeco? Antaŭ hieraŭ mi proprukule vidis vin ŝteli librojn de sinjoro Ho kaj esti pende batata." Kaj Kung Ji-ĝi rugiĝis, ĉiu blua vejno sur lia frunto reliefigis, kaj li argumentis, "Kaŝe preni librojn oni ne povas nomi ŝtelo.....Kaŝe preni librojn!.....Jen afero de intelektuloj, ĉu tion oni povas nomi ŝtelo?" Tiam sekvis vortoj malfacile kompreneblaj, kiel 'Gentil-homo opinias natura malriĉeco', kiel, 'ĵe, hu' k.t.p. Tio kaŭzis ridegon inter la homamaso kaj gaja atmosfero regis la tutan drinkejon ambaŭ interne kaj ekstere de la montrotablo.

Oni en lia foresto priparolis, ke Kung Ji-ĝi iam studis, tamen fine li ne sukcesis en la unua ekzameno kaj ke li ne estis lerta por perlabori, sekve pli kaj pli malriĉiĝis kaj preskaŭ fariĝis almozulo. Feliĉe li bone skribis, tial li povis akiri sian ĉiutagan panon per libro-kopiado por aluloj. Bedaŭrinde li havis malbonan inklinon, t. e., frandemo kaj maldiligenteco. Nur kelkajn tagojn post la komenco de lia laboro, li kune kun la libroj, paperoj, skribilo kaj inkpleto—ĉio malaperis. Post kelkfoja ripeto de tia malapero oni ne plu petis lin kopii librojn. Ne povante trovi vivrimedon Kung Ji-ĝi, vole-nevole iam ŝtelis. Sed en nia drinkejo li estis pli bonkonduta ol ĉiuj aliaj, ke li neniam ŝuldis; kvankam kelkfoje li ne havis monon kontantan kaj ni devis provizore noti la ŝuldon sur memortabulon, la repago neniam prokrastiĝis pli ol

(denurigota sur p. 8)



EN LA LEGOĈAMBRO DE LU SIN

Vortoj De Lu Sin

Agu kiu estas agipova, kaj voĉu. kiu estas voĉipova. Donu tiom da lumo, kiom da varmo li havas. Eĉ tia malforta lumo kia lampiro, ja povas radii en la mallumo kaj ne necesas ĝisatendi la aperon de torĉo.

Se ne aperos torĉo ĝisfine, mi estos la unusola lumo. Se venos torĉo aŭ leviĝos suno, mi malaperos kun plezuro. Mi ne nur ne grumblos, eĉ ĝojos kaj donos laŭdon al la torĉo aŭ suno, ĉar ĝi prilumas la homaron, inkluzive min mem.

La vivo ne timas morton. antaŭ kiu ĝi ridas kaj dancas kaj iras antaŭen tra la morto.

Kio estas vojo? Ĝi naskiĝas sub piedpremado sur la senvoja tero kaj estas elhakita el tie, kie ekzistis nur dornoj.

Revolucio estas doloro, nepre miksit de malpuraĵo kaj sango, kaj ne estas tiel amuza kaj perfekta kiel la poetoj imagas. Revolucio estas realeco, ĝi postulas ĉiajn humilajn kaj malfacilajn laborojn. kaj ne estas tiel romantika kiel la poetoj imagas. Revolucio kompreneble detruas sed ĝi ankaŭ bezonas

konstruon; detruo estas facile plenunita, sed konstruo estas malfacila. Tial kiuj konservas en sia koro romantikan revadon por la revolucio, tuj elreviĝas. kiam ili alproksimiĝas al la revolucio dum ĝia progreso.

Ne ĉio en la vivo de la batalanto estas prikantinda kaj priplorinda, kaj tamen en ĝi nenio estas senrilata kun tio prikantinda kaj priplorinda.

Kiu el la interesoj de la imperiismo ne kontraŭas al tiuj de ni, krom ĝiaj sklavadoj? Nia kancero estas ĝia trezoro, do ĝia malamiko kompreneble estas nia amiko. Ĝi mem estas senhelpe kolapsanta kaj por sin savi el sia fatala fino ĝi malamas Sovetion pro ĝia progreso.

Se la sklavadoj volas iri militi, ili mem iru militi post sia mastro. La interesoj de ni popolo tute kontraŭas al la iliaj. Ni kontraŭas atakon al Sovetio. Ni male faligas la demonojn kiuj atakas Sovetion, kiajn ajn dolĉajn vortojn ĝi parolas kaj kian ajn justan vizaĝon ĝi ŝajnigas.

Tradukis S. J. Zee.

KUNG JI-ĜI (daŭrigo de p. 7)

unu monato kaj de sur la tabulo forviŝiĝis la nomo de Kung Ji-ĝi.

Kiam Kung Ji-ĝi jam trinkis duontason da vino kaj lia ruĝiĝinta vizaĝo iom post iom reprenis sian originalan koloron, iu alia denove lin demandis. "Kung Ji-ĝi, ĉu vi efektive scipovas legi kaj skribi?" Kung Ji-ĝi, rigardante la demandinton, mienis kvazaŭ li ne volus sin humiligi per argumentado. Ili sekve daŭrigis, "Kial vi eĉ duono da siuejaĵo ne fariĝis?" Kung Ji-ĝi tuj aspektis dekadencia kaj maltrankvila, kun vizaĝo mallumiĝinta, kaj ion parolis; sed ĉifoje ĉiuj vortoj estis tiaj kiaj "ĵi, hu, ĵe, ĵe" k.t.p. kaj nenio oni povis kompreni. Tiam ankaŭ ĉiuj ridegis: gaja atmosfero regis la tutan drinkejon ambaŭ interne kaj ekstere de la montrotablo.

Tiam mi povis ridi kune kun la aliaj, kaj la mastro min certe ne riproĉis. Krome la mastro, vidinte Kung Ji-ĝion, ankaŭ ofte lin tiel demandis por amuzi la aliajn. Kung Ji-ĝi scias, ke li ne povas babilu kun ili, sekve li povis nur alparoli infanojn. Foje li diris al mi, "Ĉu vi iam lernis legi?" Mi iomete kapjesis. Li diris, "Jes?.....do mi vin ekzamenu. Kiel vi skribas 'fenkol' en la vorto 'fenkol-fabo'?" Mi pensis, "Ĉu homo simila al almozulo taŭgas por min ekzameni?" Sekve mi deturnis la vizaĝon kaj ne plu lin respondis. Longe atendinte Kung Ji-ĝi diris sincere, "Vi ne povas skribi...Mi vin instru. Memor! Ĉi tiun vorton vi devas memori. Kiam vi fariĝos drinkejmastro, vi ĝin bezonos por kontnotoj." Mi pensis, ke mi ankoraŭ estas tre malproksima de la rango de mastro, kaj, cetero, nia mastro neniam notis fenkolfabon en kontlibron; pensante lin ridinda kaj estante senpacienca, mi malvigle respondis, "Kiu bezonas vian instruon? Ĉu ne estas la vortero 'fen-

kiu signifas 'varma suda vento' plus la vortero 'kol' kiu estas parto de la korpo?" Kung Ji-ĝi aspektis tre gaja, kaj frapetante la montrotablon per du longaj fingrungoj kaj kapjesante li diris, "Jes, jes!.....La vorton 'fenkol' oni povas skribi en kvar manieroj, ĉu vi scias?" Mi fariĝis des pli senpacienca kaj elpuŝante la buŝon foriris. Kung Ji-ĝi ĵus trempis sian ungon en vinon por skribi sur la montrotablo, sed, vidinte ke mi tute ne interesiĝis li ĝemis kun mieno ege bedaŭranta.

Kelkfoje najbaraj infanoj, aŭdinte ridadon, ankaŭ alkuris por partopreni la amuzon kaj ĉirkaŭis Kung Ji-ĝion. Tiam li donis al ili po unu fenkol-fabo. Kiam la infanoj la fabojn finmangis, ili ankoraŭ ne disiĝis, sed la telereton fiksigardis. Kung Ji-ĝi konfuziĝis, etendis siajn kvin fingrojn, kovris la telereton kaj kliniĝinte diris, "Restas jam ne multe, restas por mi jam ne multe!" Rektiĝinte li denove ekrigardis la fabojn, kaj kapneante diris, "Ne multe, ne multe multe hu ĵaj? ne multe ĵe!" Do la grupo da infanoj disiĝis ridante.

Tiamaniere Kung Ji-ĝi faris la aliajn gajaj, sed sen li oni ja tute egale vivis.

Iutage, eble du-tri tagojn antaŭ la Aŭtunmeza Festo, nia mastro estis reguliganta la konton. Preninte la tabulon de la muro li subite diris, "Kung Ji-ĝi jam longe ne venis. Li ankoraŭ ŝuldas dek naŭ monerojn." Tiam ankaŭ mi konsciis ke li efektive jam longe ne venis. Iu drinkanto diris, "Kiel li povus veni...Lia kruro rompiĝis pro batado." La drinkejmastro diris, "Ha!" "Li ankoraŭ ĉiam ŝtelis. Ĉifoje li perdis entute sian prudenton kaj priŝtelis eĉ Elektitulon." Ting. Ĉu lin oni povas priŝteli? "Kio poste?" "Kio? Unue li skribis konfeson, poste oni lin batadis dum pli ol duonokto, ĝis rompiĝo de lia kruro." "Poste?" "Poste lia kruro rompiĝis." "Kio do, post la rompiĝo de lia kruro?" "Kio?.....Kiu scias? Li eble mortis." La mastro ne plu demandis, kaj denove malrapide kalkulis sian konton.

Post la Aŭtunmeza Festo, la aŭtuna vento malvarmiĝis tagon post tago kaj

Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj!

Traduko, represo, resume kaj ĉiumanieraj utiligoj de materialoj en nia bulteno estas permesataj kaj bonvenaj, kondiĉe ke ili ne estos malice kripligataj kaj la utiliginto plenumos niajn jenajn petojn:

1) Post la traduko, represo, resume aŭ aliaj utiligoj rimarki aparte el kiu numero de nia bulteno ĝi estas tradukita ktp.;

2) Sendi al ni 4 ekzemplerojn de la traduko, represo aŭ resume kaj sur ili noti el kiu numero kaj kiu artikolo ĝi estas tradukita ktp.;

3) Sciigi al ni kia estas la ĵurnalo aŭ gazeto, sur kiu aperis la traduko, represo, aŭ resume kaj, se eble, kiom da legantoj ĝi posedas.

Se iu el vi, karaj samideanoj, interesiĝas pri Popola Ĉinio, bone utiligas niajn materialojn kaj volas pli multe informiĝi, sciigu al ni vian bezonon kaj ni volonte vin provizos laŭeble.

"Plej bona propagando estas praktiko". Estas jam tempo por antaŭenpuŝi nian movadon al pli alta stadio ol nur propagandi. Kunlaboru, ĉiuj esperantistoj tra la tutmondo!

ABONMANIERO

1. Senpagan specimenon ni sendos al ĉiu, kiu letere postulos. Se iu volas regule ricevi nian gazeton, volu pagi al niaj perantoj aŭ rekte al nia administracio.
2. Kun ĉiuj esp-eldonejoj kaj esp-gazetoj ni volonte interŝanĝos reciproke periodaĵojn aŭ librojn. Sed de individuaj legantoj ni ne akceptas gazetojn. Se en lia lando ankoraŭ ne troviĝas nia peranto li povas aboni per respond-kuponoj aŭ novaj esp-aj libroj.

NIAJ PERANTOJ:

FINNLANDO: Niilo Kavenius, Niklaksenkatu 10/14 Turku. (Jarabono: 300 Fmk.)

FRANCIO: Labor-Esperantista Federacio, 34, Str. Chabrol—PARIS—X. (Jarabono: Fr. Fr. 450)

GERMANIO: Arthur Schulze, Berlin-Lübars, Kolonie, Waldesfriede 77. (Jarabono: 6 D. M.) Kurt Elias, Leipzig W 35, Philipp-Reis-Strasse 81.

JAPANIO: Japana Esperantista Asocio, Hongo-Motomaci 1-13. Tokio

SVEDIO: Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg. (Jarabono 6.50 Kronoj)

Rimarko: Legantoj en aliaj landoj de Nord-Eŭropo estas petataj ankaŭ sendi sian abonon al nia sveda aŭ finlanda peranto. Por legantoj en ceteraj landoj ni provizore fiksis la prezon je unu respond-kupono por ĉiu numero aŭ samvaloraj novaj esp-aj libroj.

國內定價: 每期基價一元五角, 全年十二期基價十八元, 平寄郵費在內, 掛號另加

vintro proksimiĝis; kvankam tuttage mi restis apud la fajro, vatita ĵako jam estis necesa. Iun posttagmezon nin honoris neniuj klientoj, kaj mi estis sidanta kun okuloj fermitaj. Subite mi aŭdis voĉon, "Varmigu tason da vino." La voĉo, kvankam tre mallaŭta, estis tre familiara. Sed, rigardante mi trovis neniun personon. Stariginte mi rigardis eksteren kaj vidis Kung Ji-ĝion sidi malsupre de la montrotablo kontraŭ la sojlo. Lia vizaĝo estis nigra kaj malgrasa kaj tute deformiĝis; li portis eluzitan substofitan jakon, kun kruroj krucitaj, kaj sub si junka sako alligita ĉe la ŝultroj per pajloŝnuro. Vidinte min li denove diris, "Varmigu tason da vino." La drinkejmastro ankaŭ elŝovis sian kapon kaj diris, "Ĉu Kung Ji-ĝi? Vi ankoraŭ ŝuldas dek naŭ monerojn!" Suprenrigardante Kung Ji-ĝi tre malsprite respondis, "Tiu...mi likvidos la venton antaŭ fojon. Ĉifoje mi aĉetos kontante. Donu vinon bonan!" La drinkejmastro ankoraŭ same kiel li diris al li ridante, "Kung Ji-ĝi, vi denove ŝtelis?" Sed ĉifoje li ne multe sin senkulpiĝis, nur diris mallonge, "Ne ŝercu!" "Ŝerci? Se vi ne ŝtelis, kial vian kruron oni batadis ĝis rompiĝo?" Kung Ji-ĝi diris mallaŭte, "Ĝi rompiĝis pro falado, pro, falado..." Lia rigardo ŝajnis peti la drinkejmaston ne plu tion priparoli. Tiam jam kolektiĝis kelkaj personoj. Ili ĉiuj ridis kune kun la mastro. Mi varmigi la vinon, ĝin portis eksteren,

kaj metis sur la sojlon. Li elprenis el sia ŝirita poŝo kvar moneretojn kaj metis en mian manon. Mi vidis, ke estas koto sur tutaj liaj manoj, ja per kiuj li estis veninta. Baldaŭ li eltrinkis la vinon kaj denove sidante foriris per manoj, kiam la aliaj babiladis kaj ridadis.

Post tiam, denove longe ni ne vidis Kung Ji-ĝion. Je la jarfino, depreninte la tabulon la drinkejmastro diris, "Kung Ji-ĝi ankoraŭ ŝuldas dek naŭ moneretojn!" Je la Drakboata Festo de la sekvanta jaro li denove diris, "Kung Ji-ĝi ankoraŭ ŝuldas dek naŭ moneretojn!" Je la Aŭtunmeza Festo, tamen li tion ne diris. Venis denove jarfino, sed ni ne plu lin vidis.

Eĉ ĝis nun mi lin ne plu vidis,—eble li efektive mortis.

Giani

(1) Fabo spicita per fenkolo.

(2) Arkaj vortoj el ĉina lingvo, kiuj uziĝas nur surpapere en la klasikstilaj verkoj.

(3) Oni ĉi tiujn vortojn presas en skribmodelo por infanoj pro ilia simpleco.

(4) Lernanto sukcesinta en la unua ekzameno kaj enirinta urban lernejon, dum la tempo de la malnova edukistemo.

(5) Lernanto kiu sukcesis en la provinca ekzameno dum la tempo de la malnova edukistemo.

(6) La 5a de la kvina monato laŭ la luna kalendaro.

